unuopulo rajtas uzi nekutimajojn, rompante la stilan unuecon? Kompreneble jes. Ĉiu scienca atingaĵo rompas la unuecon, provizore. Ne ĉiu povas ŝofori aŭtomobilon, ne ĉiu komprenas la nociojn de Einstein, ne ĉiu scias legi logistikan formulon. Por uzi atingaĵon oni devas studi.

Kontraŭ la scienco oni ofte klopodis gardi unuecon per protesto kaj malpermeso; neniam oni sukcesis. Sciencaj eraroj aŭtomate malaperas; sciencaj pravoj fine venkas, ofte tra multo da sango kaj ploro.

Ĉu do oni morgaŭ uzu ĉiujn verbajn radikojn kiel prepoziciojn? Kial oni farus? Por la scienco sufiĉas ke oni komprenas la eblon, ke oni vidas la rilatojn inter la gramatikaj formoj. Se ĉiuj agnoskas ilin, la eblojn oni senplie uzos; se kelkaj ne agnoskas la eblojn, oni diskutu plu kaj ne trudu.

Ĉu do oni evitu uzi ilin? Same ne. La novaj ebloj donas koncizon al la lingvo kaj forton. Ili estas valoraj rimedoj por bona stilisto, por lerta poeto. Speciale la arto uzos la atingaĵojn de la scienco; tra la arto ili fariĝos kutimaj.

11. La vojo al sukceso.

Dum *ni* vivos estos necese, ke la sciencistoj poseedas po diversajn lingvojn. Imagu ke oni ekinstruus Esperanton al ĉiuj novaj liceanoj, — infanoj dekdujaraj. Pasus 30 jaroj ĝis ili verkus grandan parton el la sciencaj traktatoj per Esperanto. Pasus aliaj 30 jaroj antaŭ la malaktualiĝo de la nacilingvajoj. Ĉu oni tiam ĉesu instrui naciajn lingvojn? Malimagu; eĉ nun oni instruadas la Latinan kaj la Grekan.

Estus bone se oni instruus Esperanton al ĉiuj liceanoj. Sed oni ne povas ĉesigi la instruon pri la aliaj lingvoj. Anglaj eksperimentoj montris ke oni instruas la Francan krom Esperanto, same rapide kiel nur la Francan. Kono de Esperanto tre akcelas instruiĝon pri aliaj lingvoj. Multaj devas lerni tri fremdajn lingvojn aŭ pli; ili gajnos tempon studante Esperanton antaŭe.

Kial Esperanto estas taŭgega por instruaj celoj? Ĉar ĝia analiza gramatiko jam tre similas gramatikon funkcian. Gramatiko pure funkcia plej klare vidigas la esencajn taskojn de ĉiuj lingvoj; ĉiuj lingvoj ja devas plenumi la samajn taskojn fundamentajn. Ilin oni vidigu per planlingvo.

Se nia gramatiko estos pure funkcia, ĝi havos pli da propra vivo ol nun; ĝi estos pli interesa por lingvistoj; ĝin oni pli volonte uzos. Jen nia vojo.

RECENZO KAJ BIBLIOGRAFIO.

Paul Neergaard: **Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj kaj kiel prilukti ilin;** The Esperanto Publishing Company, Rickmansworth, Anglujo, 1954. 16 × 23 cm², 234 p., 75 ilustraĵoj kaj 9 koloraj elfaldeblaj bildpaĝoj. Bindita 20 ŝ.

Oni povas karakterizi ĉi tiun libron specialisma konsultlibro por hortikulturistoj kaj ĝardenamatoroj. La demando kiaj libroj oni povas sukcese eldoni en Esperanto ŝajnas al mi malfacila: oni ne scias la amplekson de la grupo de personoj kiuj povus bezoni aŭ deziri ian libron; ankaŭ ne kiom da ili efektive aĉetos. Tio speciale validas, kiam temas pri neordinara libro de speciala enhavo. Ĉar koncernaj eldonaĵoj maloftas aŭ mankas en Esperanto, oni devas kuraĝe preni riskon. Tial oni devas laŭdi la Esperanto-eldonejon, ke ĝi faris tiun eksperimenton. Kelkaj bonegaj cirkonstancoj favoras la provon: la aŭtoro estas Akademiano, kiu krome estas konata pro la verkado de kelkaj esperantaj terminaroj kaj pro la redaktado de „Esperantologio". Plue la aŭtoro ĝuas mondfaman reputacion en la pritraktita kampo, la plantmedicino, kaj la teksto estas plene konforma al tio. Kaj fine la aperaĵo de la verko estas elstare bona: la papero, la ilustraĵoj, la koloraj bildpaĝoj, la bindo, ĉio indikas la plej grandan prizorgon. Oni devas tuj aldoni ke kompare ĉi tion la prezo estas malalta.

La esperantistaro nun pruvu ke eldonado de tiaj verkoj finance estas ebla. La vendo de tiu ĉi verko baros aŭ glatigos la vojon al eldono de similaj faklibroj, kiujn ni ege bezonas en Esperanto, speciale ĉar ili reprezentas la sciencan flankon de nia kulturo.

La intelekta nivelo de la libro estas tia, ke laikoj kun iom da klero povas kompreni la enhavon; ĝi estas bona informfonto por la interesiĝema ĝardenulo, por la profesia same kiel por la amatora. En klara lingvo la aŭtoro pritraktas la nunan gravecon de la plantmalsanscienco, la simptomojn kaj kaŭzojn de ĉiaj plantmalsanoj kaj difektoj de fizika, planta kaj besta naturo, kaj kiel oni devas kuraci la atakitajn plantojn. Li detale informas pri la manieroj de batalado kontraŭ nutromankoj, ŝimoj, insektoj, ktp., kaj li donas abundajn konsilojn pri agado, rimedoj kaj kuraciloj. Oni povas trovi en konvenaj tabeloj multan scion, facile konsulteblan kaj ordigitan laŭ diversaj vidpunktoj: laŭ sezono, laŭ mastroplantoj, laŭ parazitoj. Krom tre specialan konon la libro donas bonan ĝeneralan informon pri la ebloj de la plantpatologio kaj pri ĝia signifo en la moderna socio. Konklude: el scienca vidpunkto laŭ mia modesta plantpatologia scio, la libro meritas al plej altan laŭdon kaj eĉ valoras ke oni akiru la legokapablon pri Esperanto. La Esperantistoj prave povas montri ĝin al neesperantistoj, speciale al hortikulturaj fakuloj.

Scienca Revuo devas dediĉi kelkan spacon al la terminoj. Kiel ni scias el lia *„Fremdvortoj en Esperanto"* Neergaard preferas uzi tradukitajn terminojn laŭ ekzemplo de la naciaj aŭ antikvaj lingvoj. Li transprenas ortografitan fremdvorton en la dua loko. Ni forte aplaŭdas la uzon aŭ enkondu-

kon de nomoj kiaj *bekskarabo, longkrurulo, grosfolivespo, penikŝpinulo,* ktp. Tamen kelkaj terminoj troviĝas, kiuj igas demandi pri ilia taŭgeco. La kreo de neologismo ofte estas afero de persona gusto aŭ pli-malpli hazarda venko de la internaciemo super la plenesperantemo. La unua venkis en Neergaard, laŭ mia opinio malprave, ĉe la propono de la novvortoj *masklo* kaj *femalo* por vira kaj ina organismoj. Femalo estas plene identa kun ino, do nenecesa; masklo identa kun la unua signifo de viro en PV, do ankaŭ mankipova. Bedaŭrinde ili eĉ balastos la venontan eldonon de PV. Evitindaj estas ankaŭ *gazono,* ĉar jam ekzistas *razeno.* La vorto *grameno* por *graminaco* (W ü s t e r) aŭ *gramenaco* (PV) estas donata por indiki ian specion el la grupo de gramenacoj kaj estas akceptebla mallongigo. Valora estas *greso,* proponita kiel parta sinonimo de grameno, „i.a. iu ajn el la herboj el familio gramenacoj uzitaj kiel furaĝo por brutoj kaj aliaj gresantaj bestoj, en ĝardenoj uzataj por herbotapiŝoj". De *greso* oni do povas derivi *gresejo,* kiu estas herbejo precipe el gramenoj, manĝeblaj far brutoj. Ĝi estas kategorio de gramenejoj, el kiuj la grenkampoj estas alia.

La verbo *gresi* por manĝi greson (aŭ ankaŭ por paŝtiĝi?) ne regule rilatas al greso: oni inklinas konjekti ke gresi signifus „esti kovrita de greso" analogie al flori aŭ „provizi per greso" analogie al sukeri.

Alia neologismo kies neceso estas dubebla, estas *infesti,* kio signifas kontakti kun malsanigaj ĝermoj, kiuj ne nepre malsanigas. Kontraŭ ĉi tiu vorto N e e r g a a r d limigas la signifon de *infekti* al efektivigi malsanon per mikroboj. Do vivaĵo infestita ne ĉiam estas infektita. Mi traserĉis la libron pri la uzo de la radiko infesti kaj nur trovis unu lokon de apliko (p. 173 en titolo de subĉapitro). En ĉapitro 5, kie akra distingo inter infesti kaj infekti estas atendebla, infesti forestas, nur temas pri infekti kaj ataki kaj oni restas dubanta ĉu temas pri alveno de ŝimsporoj sur la planton (infesto) aŭ pri la penetro de hifoj en la foliojn (infekto). En kelkaj aliaj lokoj la vorto infekti estas uzita, kie la aŭtoro povis uzi infesti: p. 38 en „infektaĵportantoj" por virusportantaj insektoj; p. 174 en „la fungo infektas el la tero". Plue N e e r g a a r d parolas pri planto „infektita kun insektoj" en la senco de „surhavanta insektojn", do fakte en la senco de infesti. La signifo de la ofte uzita vorto desinfekti, kvankam tiu estas ŝajnkunmetaĵo, iom konfliktas kun la nova signifo de infekti; desinfekti nun ja fariĝas identa kun malinfesti.

Mankipova estas ankaŭ la termino *kulmo* por tigo de grameno kaj *ŝalmo* por la sama. La lasta, jam forĵetita de N e e r g a a r d mem, fakte tute ne devis esti enlistigita en la terminaro.

La novvorto *ŝoso* estas botanika termino kies difino „elkreskanta tigo aŭ branĉeto" ne sufiĉe markas la esencon, ĉar verŝajne celiĝas „tigo aŭ branĉeto dum la periodo de laŭlonga kreskado". Por plenkreskinta ŝoso ni ja havas la vortojn tigo, branĉeto kaj vergo.

En *parafiso* mi preferus *z,* ĉar la elparolkutimo inklinas al *z*-sono.

La vorto *suscepto* por *mastroplanto* ŝajnas ne necesa. Eĉ oni ne bezonas *susceptema,* ĉar tio estas identa kun malrezista aŭ infektiĝema aŭ sentema (p. 131). Ankaŭ frapas ke la rilato inter la signifoj de suscepto kaj susceptema estas malregula.

Mankas en la terminaro la vorto *guŝo,* kiu kelkloke troviĝas en la libro (p. 64, 71, 168). Tiu vorto estas nenecesa, ĉar identa kun legumeno.

La vorto *damaĝo,* kiu abundas en la libro, havas ĉiam la signifon de *difekto,* do estas nenecesa.

En diversaj terminoj ni renkontas la finaĵon *-ozo* por malsano ekz. *arĝentfoliozo, strekozo, striozo, folirulozo,* ktp. B r i q u e t *(Medicina Vortaro)* difinas -ozo: „substantiva sufikso kiu signifas aŭ havanta multajn, aŭ kaŭzata de." Plejofte oni do trafe povas uzi ĝin por malsano. Krom tiuj plenesperantaj terminoj, troviĝas kelkaj de tiu aspekto: *klorozo, virozo, fotozo,* ŝajne puresperantaj vortoj, sed ili tamen ne rilatas al kloro, viro kaj foto kiel la finaĵo konjektigas, sed al pale verda, viruso kaj lumo. Jen la eterna demando sin prezentas: kial ne fari plenesperantajn terminojn palozo, virusozo kaj lumozo, neglektante la internaciajn fremdvortojn? Ankaŭ terminoj kiaj *trofozo, termozo, toksikozo, mikozo* estas radikaj neologismoj, kiuj facile povis esti evititaj se oni uzas mankozo, varmozo, venenozo kaj fungozo. Koncerne la alprenon de internaciaj terminoj, kio principe estas laŭfundamenta, oni estu modera. Speciale en kazoj, kiam Esperanto estas kapabla liveri pli elegantan aŭ pli mallongan vorton. La malinklino de neesperantistaj fakuloj penadi legi esperantan tekston ne pravigas, ke ni balastas nian lingvon per abundo da fremdaĵoj kiuj ofte malklarigas nian vortfaran sistemon. Ni ankaŭ ne bezonas la vorton *sporangio* por sporujo kaj *sporangioforo* por sporujportilo, *teleŭtosporo* kaj *uredosporo* por vintrosporo kaj somersporo. En kazo de dubo oni ja povas aldoni interkrampe la latinan terminon.

Kelkfoje la uzo de kutimaj vortoj trafas pro devio de la vera senco. Ni jam nomis infekti. Tio ankaŭ okazis ĉe evoluo (erare evoluigo) anstataŭ disvolviĝo (p. 181) kaj en *prilukto,* kiu vorto estas konsekvence uzita por la batalo kontraŭ parazitoj. Fakte la signifo de *lukti* estas: korpe batali sen armiloj (PV), ĝi estas ŝanĝita en metafora senco. En faktermino por daŭra uzo tio ŝajnas al mi malaprobinda. Oni devas akcepti *batali,* kion pravigas la multarmila kontraŭagado al la parazitoj. La prefikso *pri* ne necesas.

Kelkaj esprimoj kun *„densa"* estas eraraj ekz. *dense ĉirkaŭ la trunko* (p. 180) por tuŝe aŭ preme ĉirkaŭ, *dense fermita tenejo* (p. 182) por tute fermita, *aerdense fermita* (p. 156) por hermete fermita. Anstataŭ *ĝenerala junipero* (p. 167) mi preferas *„ordinara junipero".*

Sorpujo (p. 174) signifas ujo por la arbo, kiu nomiĝas laŭ PV sorpo; la sufikso troas. „Pestplena ĝardeno" (p. 16) estas naciismo anstataŭ „multmalsana" aŭ „malsanega ĝardeno". Ni pli-malpli detale kritikis la terminojn, ĉar tio estas la tasko de Scienca Revuo. Tio neniel malpliigas nian grandan

ŝaton por la verko kaj por la grava atingo de ĝia aŭtoro. Unuaranga evento, kia la apero de sciencnivela libro, valoras detalan kritikon.

G. F. M.

623.454.9 : 616(041) = 089.2

Ni ne povas silenti! Japanaj Medicinistoj Alvokas al la Tuta Mondo pri la Domaĝoj de l' A-Bomboj. El la artikoloj de tri Japanaj gekuracistoj.

La Esperantlingvan tradukon eldonis Esperanto-Kenkjuŝa, 87 Matuba, Miya-tyo, Aitiken, Japanio. 40 paĝoj. Prezo $ 0.17 aŭ 3 respondkuponoj.

Ĉi tiu broŝureto estas rezulto de proponita internacia kuracista kongreso, kiu ne okazis. Oni intencis ĝin okazigi en Italujo dum la aŭtuno de 1952. Ĝia plena nomo estus: „La Monda Kongreso de Medicinistoj por la Kondiĉoj Aktualaj de Vivo", (t.e. de la vivo post la dua mondmilito) kaj la plej grava programero estus raporto de japanaj kuracistoj pri „Atombombo-malsano." Sed ĉi tion oni ne povis publikigi, ĉar en la lasta momento la kongreso estis subite malpermesata de la Itala registaro. La motivo estas nekonata, sed ministro diris, ke la kongreso estas subtenata de la Kominformo. Oni suspektas ian eksteran influon. Oni esperas iam estontece okazigi la kongreson en Skandinavio.

Dume la verkintoj sentas, ke ili ne povas silenti, kvazaŭ temus pri nur ordinara kuracista kongreso, kiu ne okazis, aŭ kvazaŭ ili raportus pri la kuracado de nur ordinara malsano. La efikoj de la atoma bombo estas tiel teruraj, ke estas urĝe necese informi ĉiujn pri la danĝeroj, kiuj jam minacas la homaron. Tamen ĉi tiu broŝureto, kvankam provizora kaj ne tro teknika, ne estas nura sensaciaĵo sen scienca valoro. Ĝi enhavas faktojn ne menciitajn en aliaj raportoj, kiel ankaŭ fotografaĵojn de la teruraj vundoj kaŭzitaj de la katastrofo.

Kuracisto de hospitalo apud Nagasaki diris: „Kvankam ni havis la plej bonajn instalaĵojn kaj kapablojn, ni povis fari al la malsanuloj nur ordinaran kaj neperfektan kuracadon por ĝeneralaj vundoj kaj brulvundoj antaŭ la fino de la sekvinta monato."

Ni konsideru la problemon, kiu subite prezentiĝis al la malmultaj kuracistoj, kiuj pretervivis la katastrofon. Preskaŭ ĉiuj materialoj kaj instrumentoj de ilia arto subite detruiĝis, kiel ankaŭ multaj transportiloj, kaj pli ol 12 horoj jam pasis, antaŭ ol oni povis transporti la vunditojn al unu ankoraŭ staranta hospitalo. La eksplodo ne nur kaŭzis multajn brulvundojn, sed ankaŭ enpuŝis multege da etaj disrompaĵoj ne ĉiujn partojn de la korpo, inkluzive la pulmojn; oni povis steteskope aŭskulti grincetojn ĉiufoje kiam la paciento spiris. Krom tio estis la efikoj de preskaŭ tute nova malsano kaŭzita de la radio-aktiveco.

En la jaro 1898, kiam S-ino Curie eltrovis la radiumon, ĝi estis tiel valora por la kuracado, ke eĉ eta frakcio de gramo kostis milojn da pundoj, sed la detrua radioaktiveco de la atoma bombo egalis al 100 000 000 tunoj da radiumo. Do kiam la unuaj efikoj de la bombo eble jam malaperis, post du semajnoj eble komencis aperi la „atombomba malsano", kies naŭzajn simptomojn oni ĉi tie priskribis. Eĉ post unu ĝis sep jaroj povas aperi novaj simptomoj.

Aliaj fenomenoj antaŭe apenaŭ menciitaj estis la „nigra pluvo", kiu falis post la eksplodo, kaj la stranga, netolereble naŭza fetoro, kiu sentiĝis ĉie en la hospitaloj; ankaŭ la defalado de haroj, kiu ŝajnas negrava, sed efektive estis fatala simptomo.

Kompare kun tiaj gravegaj problemoj, lingvaj punktoj ŝajnas apenaŭ diskutindaj. Sed en la postparolo oni pretendis, ke la traduko de la raporto estas reviziita de eminenta Esperantisto. Anglismoj abundas, kio estas komprenebla, ĉar en multaj Aziaj landoj la Angla estas multe pli vaste konata ol la Franca, sur kiu Esperanto plejmulte baziĝas.

Ekzemple en la subtitolo, kaj en pluraj aliaj lokoj, troviĝas „domaĝo" anstataŭ „difekto", (en paĝo 32-a „domaĵo"). Vidu PV kaj OV paĝo 539. En ĉi tiu letero 248-a Zamenhof mem difinis la vorton. Eble estas domaĝe, ke li tiel elektis kelkajn radikojn, sed tia estas la lingvo. Kelkaj provis enkonduki la neologismon „damaĝo"; tio estas senbezona, sed ĝi estas preferinda, ol uzi fundamentan radikon malĝuste. Simile ĉe p. 7 „ĝentila flegistino" (dolĉa, delikata, malkruda), p. 18 „gangleno" (gangreno), p. 20 „ideoj" (idoj), kaj sub la kontraŭaj ilustraĵoj (dufoje) forigu „sed" post kvankam, aŭ se oni preferus, anstataŭigu „sed" per „tamen". (vidu P.V.). Ankaŭ ĉe p. 34 „surprizis" (mirigis); ĉe p. 34. „pli ol la pure scienca kongreso", forigu „la".

T.L.C.B.

551.44(05) = 862 = 089.2

Speleolog, Revuo de speleologia sekcio de turista societo *„Zeljeznicar"*, Zagreb, Jugoslavio, 1a numero 32 p., 14 × 20 cm².

Ni anoncas ĉi tiun nacilingvan gazeton pro la fakto, ke ĝi aldonas al ĉiu artikolo esperantan resumon (entute preskaŭ 2½ paĝoj en Esperanto). Ĉar nek la titoloj de la kontribuaĵoj, nek la klarigoj de la figuroj estas en Esperanto, la fremda leganto spertas, ke grava parto de la enhavo restas al li nekomprenebla, kvankam malmultaj linioj en Esperanto povus malkaŝi al li krome la signifon de ĉiuj ilustraĵoj.

G. F. M.

001(05) = 089.2(41)

Scienco kaj Tekniko, Brita Esperanta Scienca Asocio. 6 p. Numero 17, Dec. 1953.

Enestas unu artikolo, nome pri Plastoj far M. Lewin. (Plasto, nova radiko por organikaj, sintezitaj kaj modleblaj substancoj).

G. F. M.